

# ESPERANTO\*INFO

\*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

## 100A UNIVERSALA KONGRESO, LILLO 2015

La subskribintoj de tiu ĉi raporto konfesas, ke ni partoprenis neniu el la antaŭaj 99 Universalsaj Kongresoj (UK), do ni ne povas taksu, ĉu tio kio okazis estis averaĝe pli aŭ malpli bone ol en aliaj kongresoj. Ni ja ĉeestis naciajn kongresojn sed en tiaj aranĝoj ni renkontiĝis kun 100 aŭ maksimume 250 homoj. En Lillo partoprenis dekoblo da homoj, pli ol 2600 (inter ili 15 katalunoj) el 83 landoj, do temis pri tute alia nivelo. Ege ŝokis nin, ke dum la tuta kongresa semajno oni trovas konatajn kaj nekonatajn esperantistojn en trinkejoj, restoracioj kaj ĉie sur la stratoj kaj placoj de la urbo.

### Movada Foiro

Verŝajne unu el la plej ŝatataj momentoj de ĉiuj universalaj kongresoj estas la Mo-



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Verŝajne unu el la plej ŝatataj momentoj de ĉiuj universalaj kongresoj estas la Movada Foiro.

### ESPERANTO\* CAT

\*Associació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2014-2015:  
individua abonanta membro, 64 eŭroj;  
pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta  
membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,  
Agència 001, Barcelona  
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
UEA-konto: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:  
Prezidanto: Josep Franquesa;  
sekretarioj: Xavier Alcalde kaj Gemma  
Armada; vicprezidanto: Carles Vela;  
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj: Alfons  
Tur, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj  
Ramon Perera.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental),  
Països Catalans/Kataluna Landaro  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633  
Ret-adreso: info@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

vada Foiro. Tiel, pli ol 120 budoj montris en Lillo la diversecon de la Esperanto movado. Asocioj fakaj, landaj, religiaj... ĉiuj povis prezenti siajn publikaĵojn, siajn renkontiĝojn kaj respondi al la demandoj de la publiko. Tio okazis antaŭ la solena inaŭguro, do por multaj homoj estis la

unua fojo renkonti malnovajn geamikojn, sed ankaŭ ekkoni persone virtualajn konatulojn, eĉ verkistojn kaj aliaj gravulojn. Kataluna Esperanto-Asocio, kiel kutime, havis sian propran budon por informi la ĉeestantojn pri sia agado kaj konkrete pri sia venonta kongreso en Mataró.

### KEA-KOTIZO RABATIGAS ENSPEZ-IMPOSTON

En la nuna jaro la Departamento pri Kulturo de la Generalitat agnoskis KEAn kiel plenrajtan membron de la "Cens d'Entitats de Foment de la Llengua Catalana".

Tiu rekono ebligas al la membroj de nia asocio redukti sian pagon en la aŭtonoma parto de la persona enspez-imposto (IRPF) je la 15% de la sumoj donacitaj al nia asocio dum la jaro 2015.

Oni konsideras tiajn la pagojn de la ordinaraj membrokotizoj kaj la mondonacojn, kiujn vi faris dum la jaro 2015. Ne eblas rabato en la imposto pro la kongreskotizoj, abonado al revuoj aŭ aĉeto de libroj.

## Solena Inaŭguro

La solena inaŭguro estis interesa kaj kortuŝa. Kompreneble temis pri jubilea kongreso, la 100a, kaj Lillo troviĝas sufiĉe proksime de Bulonjo ĉe Maro, kie okazis la unua kongreso en 1905. Krom la tradiciaj aferoj, kiel la salutvortoj el la reprezentantoj de ĉiuj partoprenantaj landoj, elstaris la inaŭgura prelego de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) Mark Fettes, kiu majstre miksis la faman prelegon de Zamenhof en la solena inaŭguro de la unua kongreso kun la sia propra. Estis ankaŭ speciale kortuŝa la parolado de s-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, la nepo de d-ro Zamenhof, kiu post emociplenaj vortoj transdonis por venontaj okazoj la reprezentadon de la familio al siaj du filinoj.

## Internacia Kongresa Universitato

En la 68-a Internacia Kongresa Universitato partoprenis kiel rektoro Jesper Jacobsen, franc-dana teoria fizikisto. La prelegintoj tuŝis tre diversajn temojn, kiel la teorion de relativeco (Amri Wandel), la budhisman kosmon (Bill M. Mak), la prahindeŭropean lingvon (Cyril Brosch) aŭ la etikajn problemojn de la artefarita inteligenteco (Federico Gobbo). Entute, dek interesaj prelegoj al kiu aldoniĝis aliaj naŭ kadre de la Scienca Kafejo (fare de aliaj gravuloj, kiel Davide Astori, Probal Dasgupta aŭ Stefano Keller), kiuj estis elektitaj inter la proponoj ricevitaj por partopreni en la ĉi jara IKU.

## Kongresa temo

Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj estis la kongresa temo de la UK. Por prezenti tiun interkulturan vidpunkton multe influis, ke la triopo reĝisora estis interkontinenta: Elisabeth Schwarzer el Germanio, Paulo Sérgio Viana el Brazilo kaj Usui Hiroyuki el Japanio. Partoprenis en la diversspecaj kaj diversenhavaj sesioj konataj fakuloj kiel Probal Dasgupta, A. Giridhar Rao kaj Ilo-na Koutny. Ankaŭ denaskaj esperantistoj havis la okazon diskuti pri siaj travivaĵoj en kaj ekster Esperantujo.

## Esperantologia Konferenco

Ĉi-jare la Esperantologia Konferenco havis du celojn: retrorigardon (de la lastaj 40 jaroj) kaj antaŭvidon (de la estonteco). La sesioj okupiĝis pri diversaj temoj de la scienca esplorado de Esperanto kaj interlingvistiko. Inter la partoprenintoj, elsta-

ris Detlev Blanke kaj Humphrey Tonkin pri la retrorigardo, kaj Federico Gobbo pri la antaŭvido. Laŭ ideo de organizinto Orlando Raola, aldoniĝis nova maniero prezenti la rezultojn de esperantologiaj esploroj: afiŝmontrado. Tiel, la aŭtoroj pendigis afiŝojn pri siaj esploroj, starante apude por interagi kun la publiko.

## Aliaj prelegoj

En tia granda aranĝo tute ne eblas ĉeesti ĉiujn prelegojn, sed laŭ nia opinio ili estis sufiĉe altnivelaj. Inter la plej elstaraj sendube estis la prelego La arto paroli publike fare de Humphrey Tonkin, kiu majstre klarigis al la ĉeestantaro la sekretojn de la plej bonaj oratoroj, kiel Ivo Lapenna aŭ si mem. Ankaŭ estis tre interesa la debato pri la esperanta prozo inter István Ertl (moderiganto), Anja Christina Stecay (fakulo pri esperanta literaturo) kaj la partopreno de ĉeestantaj gravaj verkistoj kiel Nicola Ruggiero, Anna Löwenstein kaj Gerrit Berveling. Aliflanke, Dennis Keefe parolis pri merkato. Ŝajnas, ke ne ĉiuj cerboj reagis same al novaj ideoj. Pro tio kaj konsiderante ke Esperanto estas nova ideo por multaj homoj, propagandistoj devus fokusi sian agadon en speciala celgrupo, tre malgranda en la socio, sed sufiĉe malfermita por kompreni ĉi tiun novan ideon. La aliaj grupoj de la socio, paŝon post paŝo, sekvos ilin. Almenaŭ tiel okazas en aliaj sektoroj de merkato, kiam novaj produktoj aperas.

## Muziko

La muziko estis grava ingredenco de la kongreso. La organizantoj okazigis multajn bonajn koncertojn inter kiuj elstaris JoMo, Asorti, Kajto, Getch Gaetano, Kapriol' kaj la klasika pianisto Andrei Korobejnikov, kiu majstre ludis romantikajn verkojn. En la negativa flanko ni devas rimarki, ke la malbona akustiko de la centra salono, kie okazis kelkaj koncertoj, tute malhelpis la bonan aŭskultadon malgraŭ la senlacigebla kaj profesia laboro de Floréal Martorell. En la Internacia Arta Vespero ege sukcese ludis jazan muzikon la junaj fratoj Slezák el Hungario, kiuj gajnis la unuan premion.

## Bulonjo-ĉe-maro

Tiu jubilea kongreso okazis en Lillo, pro manko de sufiĉe granda kongresejo en la urbo Bulonjo-ĉe-maro, sed evidente, la tuttaga ekskurso estis la vizito, aŭ pli bone dirite la pilgrimado, al tiu urbo. Ni estis en la sama teatro, kie Zamenhof unuafoje

alparolis publike Esperanton per neforgeblaj vortoj kiel “ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj”. Brian Moon laŭtlegis la tutan zamenhofan paroladon en magie kortuŝa etoso. Tamen, eble mankis projekciado de rilataj tiamaj bildoj por pli bona “vojaĝado” al la jaro 1905. Poste, centoj da esperantistoj kune promenis ĝis la stacidomo, kie Zamenhof eltrainiĝis en la jaro 1905. En tiu placo, kiu havas la nomon de la kreinto de Esperanto, la urbestro solene malkovris novan ŝildon por la tiea monumento. Poste, la promenantaro estis akceptita en la urbomo tiun tagon escepte regata nur de la verda flago, kaj tie la urbestro anoncis la kreadon de la nova urba kultura domo Vilao Esperanto.

Aliaj programeroj Dum la intensa semajno estis ankaŭ aliaj programeroj, kiel lingvaj kursoj (de Esperanto kaj de la franca lingvo), KER-ekzamenoj, la amuza kaj fruktodona kongresa aŭkcio, la oratora konkurso por junaj talento, riĉa kaj enhavplena tago de lernado, junulara programo, tradicia futbalmatĉo (ĉi-foje kontraŭ teamo de la Okcidenta Saharo), ktp.

Solena Fermo Neeviteble longa sed ple-ninteresa solenaĵo, kie la kongresaj organizantoj resumis la rezultojn de la aranĝo, dankis la laboron de la multnombra helpantaro, omaĝis la emeritiĝontan Ĝeneralan Direktoron Osmo Buller, anoncis la nomon de lia anstataŭantino, Veronika Poór, kaj bonvenigis la respondeculojn de la venonta Universala Kongreso en Nitra (Slovakio). Kaj la slovaka ambasadoro en Belgio kaj la urbestro de Nitra parolis en sufiĉe bona Esperanto antaŭ ol transdoni la parolon al Peter Baláz, prezidanto de la Loka Komitato de la 101a UK, kiu ŝajnis sufiĉe nervoza. Strange, ni pensis, ĉar ni konas tiun spertan homon hardita en tiaj solenaĵoj. Sed baldaŭ malkovriĝis la kialo de lia maltrankvileco, kiu fakte, ne temis pri kialo sed pri kialino, ĉar tiu kuraĝulo post dankado de la laboro al sia partnerino Dorota Rodzianko, surgenue kaj neatendite antaŭ la tuta kongresano petis ringenmane, ĉu ŝi volus esti lia edzino. Bonŝance la belulino respondis jese antaŭ la aplaŭdego de la surprizitaj ĉeestantoj, organizantoj kaj estraranoj. Ĉu eblas imagi pli bonan finon por la kongreso?

Viktoro Solé kaj Ksavero Urbestro



## PLI OL 100 PARTOPRENINTOJ EN LA 37-A KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

**K**un la ĉeesto de Jorge Camacho, István Ertl kaj la muzikgrupo Kaj Tiel Plu, inter la 30a de oktobro kaj la 1a de novembro, okazis en Mataró la 37-a Kataluna Kongreso de Esperanto. Ĝin partoprenis 120 homoj alvenintaj el tel diversaj lokoj kiel Vieno, Luksemburgio, Bretonio, Okcitanio, Madrid Majorko aŭ Skotlando interalie.

La inaŭguron de la kongreso partoprenis la urbestro de Mataró. Inter la podiuloj elstarigendas la ĉeesto de konataj fakuloj pri diversaj objektoj, kiel Fabianne Berthelot (psikologio), István Ertl (tradukado), Jorge Camacho (poezio), Nicolau Dols (filologio) aŭ Igor Sosa (historio). Ili ĉiuj pritraktis diversajn aspektojn rilatantajn al la enmigrado kaj al rifuĝintoj, temo ĉiam pli aktuala nialande sed ankaŭ tutmonde.

La katalunlingva parto de la programo konsistis el paroladoj, atelieroj kaj rondaj tabloj organizitaj komune kun aliaj asocioj kiel Lliga dels Drets dels Pobles (Ligo por la Rajtoj de la Popoloj), la koruso Primavera per la Pau (Printempo por Paco), la kataluna sekcio de Amical Wikimedia, aŭ la Fundació per la Pau (Fondaĵo por la Paco), la plejmulto el kiuj ligiĝis rilate al la kongresa temo.

Se temas pri la ceteraj kongreseroj, elstarigas diversaj datrevenoj. Tiel, Kataluna Esperanto Asocio aliĝis al la celebrado de la 125 jaroj de la naskiĝo de Joan Amades kun la prezento de ekspozicio cedita de la kultura asocio Joan Amades kaj prelego de la historiisto Dani Cortijo pri la ligiteco de tiu gravega eminentulo de la kataluna kulturo kaj la esperanta mondo. Aliflanke, en la centariĝo de la unua mondmilito, ni volis rememori la esencon de esperanto kaj ties rilato kun la pacmovado en tiel malfacila momento kia estis la Granda Milito. La prelegon faris la fakulo Xavier Alcalde. Ankaŭ dum la fermo de la kongreso, responde de Xavi Redon, estis loko por omaĝi personon forte aprezatan en Mataró: Hermínia Puigsech.

En intensa kaj plurfaka programo, tamen ankaŭ novigema, ne povus manki altiraj sesioj kiel tiuj de aikido en responso de la Guillem Nicolàs majstro pri tiu korpa ba-



*La kongresa temo estis ŝancoj de enmigrado, kaj la rilataj paroladoj, atelieroj kaj rondaj tabloj estis organizitaj komune kun aliaj asocioj.*



tal-arto, aŭ tiu pri kooperativaj ludoj kiun gvidis la profesoro pri edukado por la libera tempo Mauro Viader, muzika diskuto pri la esperanta himno (inkludanta eĉ modifpropono) fare de la konservatoria profesoro Víctor Solé kaj debato ĉirkaŭ la malnova kaj nova historio responde de Lluís Batlle, membro de la Institut de Nova Història.

Pri la kultura flanko, elstaras la gvidita vizito al la plej interesaj anguloj de Mataró kaj la partopreno en trejnado de la homkastela enurba teamo, ankaŭ la ludado de unu el la plej elstaraj muzikgrupoj de la esperanta sceno, la katalun-okcitana grupo Kaj Tiel Plu. Kaŭze de lastmomenta sanproblemo de la konga muzikisto Zhou Mack Mafuila, la grupo de virtuloj



JOANA DE CATANIA

pri tradicia muziko transnacia estis devigata duobliĝi sian partoprenon kaj prezentis du antologiajn koncertojn kiuj restos sendube funde garditaj en la memoro de la bonŝanculoj kiuj havis la eblecon ilin aŭskulti kaj ĝui.

Tiun eventon antaŭis kurso pri la internacia lingvo fare de la profesoro Pedro M. Martín Burutxaga, okazinta la antaŭa semajnfino, ankaŭ en Mataró. Krom la kurso, okazis la prezento de la

libro “malgranda Proverbaro Kataluna-esperanta”, kaj koncerto de la muzikisto Pau de Nut.

Ne decus fini tiun mallongan noticon sen la esprimo de nia profunda dankemo al ĉiuj la volontuloj de la Loka Kongresa Komitato pro ilia sindediĉo kaj la fortostreĉa laboro dum la lastaj monatoj por la prizorgo de ĉiuj detaloj kio permesis la plenan sukceson de la kongreso.

## FORPASIS DARÍO RODRÍGUEZ

La pasintan 14an de oktobro, post subita malsaniĝo, forpasis Darío Rodríguez López de Silva, je 84 jaroj, en Madrido, la urbo kie li loĝis dum preskaŭ sia tuta vivo.

Edukita en profunde religia etoso, tre juna li sentis abomenon por la frankisma diktaturo. Tio igis lin lerni la katalunan kaj Esperanton, aldone al la franca. En 1961, fuĝinte el la premo de la frankismo, li ekloĝis en Perpinjano, kie li laboris kiel libro-tenisto por elstara loka esperantisto. La labor-ekspluatado, kiun li suferis, revenigis lin post unu jaro en Madridon, kie li prizorgis sian patrinon, ĉesante la Esperanto-agadon. En 1997 li rekontaktis la Esperanto-movadon kaj komencis grandan interretan agadon. Li partoprenadis en la pionira diskutgrupo soc.culture.esperanto de Usenet kaj poste en diversaj retlistoj, inter aliaj en tiuj de la katalunaj esperantistoj. Samtempe li legis ĉiutage katalunlingvajn ĵurnalojn interrete. Li tenis intensan agadon pri perado de informoj inter diversaj Esperanto-grupoj. Aparte elstaras lia tasko konstrui kunlaborajn pontojn inter katalunaj kaj hispanaj esperantistoj. Lian valoran agadon kaj sinceran amikecon kun la katalunaj esperantistoj Kataluna Esperanto-Asocio dankis en la 34a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazinta en 2008 en Sabadell, kie lia partopreno, malgraŭ lia delikata sanstato, honorigis nin.

Kataluna Esperanto-Asocio esprimas sian kondolencon al la amikoj kaj familianoj.



## REAKIRANTE RAMON FERNÁNDEZ JURADO EN LA BIBLIOTEKO DE CASTELLDEFELS

La pasintan 2an de novembro la Biblioteko Ramon Fernández Jurado de Castelldefels solene festis la reakiron de sia nomo.

En la jaro 1986 oni inaŭguris la bibliotekon de Castelldefels ; du jaroj post la forpaso de Ramon Fernández Jurado, batalanto por la libereco kaj la bonfarto de la popoloj, esperantisto, poeto kaj verkisto en la kataluna, hispana kaj esperano, kaj en la lastaj jaroj de lia vivo civitano de Castelldefels, kie li estis magistratano kaj postlasis fortan influon.

Pro liaj kvalitoj kiel civitano, verkisto kaj politikisto oni donis lian nomon al la biblioteko.

Ĝis la jaro 2011. Kiam la Popola Partio kontrolis la urbestron, profitante la translokigon al nova konstruaĵo oni forigis la nomon de Ramon kaj oni ŝanĝis ĝin al “Centra Biblioteko”. Ni memoru ke la sama afero okazis kuna Biblioteko de Katalunio en la komenco de la frankisma diktaturo : ankaŭ oni oficiale nomis ĝin Centra Biblioteko.

La nomo de Ramon restis en iu spaco apuda al la biblioteko, tamen Ramon Fernández Jurado estis bibliotekema homo, ne spacema. Li estis nelacigebla leganto kaj senĉesa uzanto de ĉiuj bibliotekoj kiujn li trovis.

Okaze de la forigo de la nomo de la poeto de la biblioteko, naskiĝis en la urbo la Kolektivo RFJ, kies celo estis depostuli la reakiron de la nomo de la biblioteko. En unu de la depostulaj agoj oni koncedis la premiojn de la Beletra Konkurso Ramon Fernández Jurado, kiu akceptis verkojn en la kataluna, hispana kaj Esperanto, kaj kiun ni klopodis restarigi.

En la pasinta majo, kvar partioj de la maldekstro sukcesis akiri la urbestron, kaj en la kunveno de la pasinta 23-a de julio oni aprovis la reakiron de la originala nomo. Nun, komence de oktobro, en la avizo jam aperas Biblioteko Ramon Fernández Jurado. Estis kvarjara ekzilo (2011-2015), iamaniere reeĥo de la ekzilo, multe pli longdaŭra, kiun li suferis dum la diktaturo.



La malplenon kiun li lasis en la nomo de la apuda ejo, oni plenigis per la nomo de la kataluna artistino Margarida Xirgu. Du luksaj nomoj.

### NOVA NUMERO DE KATALUNA ESPERANTISTO

Pasintseptembre aperis la lasta numero de la revuo *Kataluna Esperantisto, Lingvaj rajtoj kaj Internacia Lingvo*. Temas pri duobla numero traktanta temojn pri sociolingvistiko kaj interlingvistiko, entenanta la jenajn artikolojn :

1. “La esperanta ĵurnalaro dum la Unua Mondmilito”, de Javier Guerrero.
2. “Senteritoriigo en la polgermana landlimo kaj ĝia graveco por la sorba kiel minoritata lingvo (el vidpunkto de lingva pejzaĝo)” de Goro Christoph Kimura.
3. “Planlingvoj kiel metodo de lingvistika esplorado” de Hèctor Alòs i Font.
4. “Ŝanĝo kaj kontinueco de la greka lingvo : de la postklasika greka ĝis la

revolucio de 1821” de Saoia Escobar Calzada.

La numero estis prezentita la 21an de septembro en la barcelona biblioteko Joan Maragall kadre de la eventoj de la Eŭropa Lingvotago 2015. La prezento inkludis ankaŭ prelegon pri artefaritaj lingvoj kaj lingvaj rajtoj, elstarigante la simbola rilato inter la uzo de internacia helplingvo kaj la defendo de la minoritatigitaj lingvoj.

*Kataluna Esperantisto* estas kontribuo de Kataluna Esperanto Asocio favore al lingvaj rajtoj kaj lingva justeco.

### ENTUZIASMA PREZENTO EN VILA-REAL

Kadre de kontraŭkapitalisma aranĝo, la pasintan 3an de oktobro nia samasociano Joan Català prezentis la esperanto-movadon en Casal Popular de Vila-Real (Plana Baixa). Sekvis debato pri lingva demokratio kiu vekis aktivan kaj entuziasman partoprenon de la ĉeestantoj.

La aranĝo inaŭguris praktikan kurso de la internacia lingvo okazinta dum la sekva semajnfino.

## PREZENTO DE LA INTERNACIA LINGVO EN EL PORT DE SAGUNT

Sindikato CNT de la regiono Camp de Morvedre kaj ka Ateneo La Barricada de Sagunt organizis prezenton de la esperanto-movado gvidata de nia samasociano Joan Català. Vekis la atenton de la ĉeestantoj kaj historiaj afiŝoj de la revuo Popola Fronto, eldonita en Valencio dum la hispana enlanda milito.

Sekvis publika debato pri la historio kaj la nuntempo de la esperanto-movado kaj pri la konveno, ke internacian helplingvon devas starigi komuna konsento kaj ne trudo.

## MICHAEL BORIS MANDIROLA, NOVA PREZIDANTO DE TEJO



Dum la lasta Internacia Junulara Kongreso okazinta en Wiesbaden, Germanio, oni elektis la novan estraron de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Naskiĝinta en 1988, Michael Boris Mandirola estis ĝis nun la vicprezidanto de la tutmonda asocio kaj prezidantiĝas anstataŭe de la pola Łukasz Żebrowski. La itala esperantisto loĝis dum kelka tempo en Barcelono kaj ekde tiam, li estas membro de Kataluna Esperanto-Asocio (KEA). Ni deziras al li bonŝancon sukcesplenan prezidantecon en la junulara organizo tutmonda.



Prezento en El Port de Sagunt.

## MAJORKA ESPERANTISTARO FESTIS LA ZAMENHOFAN TAGON



En Marjorko, esperantistoj renkontiĝis la pasintan 12an de decembro por kunfesti la Zamenhofan tagon.

## DU NOVAJ ELDONAĴOJ EN LA KATALUNA PRI ESPERANTO

Laste aperis du artikoloj rilatantaj al Esperanto en katalunaj revuoj, ambaŭ senpage alireblaj rete. La unua publikigis en la numero 20 de la reta revuo pri literaturo kaj tradukado VISAT, eldonita de la kataluna PEN klubo. Temas pri “Traduir a la llengua universal”, teksto pri la publikigo en 1925 de la Kataluna Antologio, verkita de Montserrat Franquesa. La duan publikigis ICIP en la numero 24 de sia revuo Per la Pau. Ĝin verkis Xavier Alcalde kaj la titolo estas “L'internacionalisme pràctic de l'esperanto durant la Primera Guerra Mundial”. Tiu artikolo ankaŭ legeblas en la hispana kaj en la angla.



Abonu la plej interesajn internaciajn revuojn ĉe: <http://victorsole.com/esperanto/perado>



## RUBEN FERNÁNDEZ PRELEGIS PRI ESPERANTO AL ARTISTOJ EN AMSTERDAMO

La pasintan februaron, video-artistino kaj dokumento-reĝisoro loĝanta en Amsterdamo Noline van Harskamp vizitis Barcelonon por intervidi profesorojn kaj aktivulojn, inkluzive esperantistojn, kaj ĉeestis nian mardan rondon en Centre Artesà Tradicionàrius. Ŝiaj verkoj (rigardeblaj ĉi tie kaj ĉi tie), pli kaj pli pridemandas lingvan identecon kaj la internacian rolon de la angla.

Lastatempe, ŝi invitis la subskribinton reciproki la viziton kaj prelegi pri Esperanto en la arta superlernejo Sandberg Instituut, kie ŝi profesoras kaj provas starigi esperantan studrondon inter la studentoj. Por prepari la viziton, ŝi informis min pri polemiko nun furora en internaciaj artistaj rondoj kaj vekita de du nov-jorkaj art-kritikistoj kies kritiko pri la kvalito

de angla lingvo uzata de neanglalingvaj artistoj estigis fortajn reagojn. Surprize, ŝajnas ke modernaj artistoj ne plu komunikas nur per sia arto, sed devas karieri en internacia art-merkato uzante nur la anglan lingvon. La prelego okazis kontentige antaŭ deko da studentoj la 4an de decembro, sed montriĝis, ke niaj kutimaj argumentoj por Esperanto tro celas lingvistojn kaj lingvemulojn, dum aliaj celgrupoj havas aliajn interesojn. La tiel nomata „artefariteco” de Esperanto, ekzemple, ŝajnas tute ne ĝeni artistojn; aliflanke, la ĉeestantojn tre interesis praktikaj detaloj pri la lingvo, ekzemple vortfarado.

Krome, Van Harskamp refoje intervidis min antaŭ kamerao por surbendigi deklarojn pri Esperanto kaj aldoni ilin al siaj estontaj videoverkoj. 7-minutan parton

el tiu intervido ŝi jam publike montris la 11an de decembro en Antverpeno, Flandrio, laŭdire kun granda sukceso.

## DU NOVAJ FILMOJ ALDONIĜIS AL LA DIGITALA BIBLIOTEKO DE ARCHIVE.ORG

Temas pri du prelegoj faritaj dum la 37-a Kataluna Kongreso de Esperanto okazinta en Mataró la pasintaj 30-an kaj 31-an de oktobro kaj la 1-an de novembro.

Danke al tiu aldono jam estas 9 la filmoj publikitaj en la tutmonda digitala biblioteko archive.org fare de nia asocio Lluís Batlle. Ĝi inkludas ankaŭ aliajn sep raportojn de la 36-a Kataluna Kongreso de Esperanto (kaj 1-a Okcitana), okazinta en Salardu (Arana valo) en 2013. Kelkaj filmoj estas katalunlingvaj, aliaj okcitanlingvaj kaj aliaj en Esperanto.

Nuntempe disponibles la jenaj filmoj:

- Carles Vela-Historiaj eventoj de la jaro 13 (en esperanto)
- Ferriol Macip-Okcitanio, nevideblando (en esperanto)
- Jacme Tupiac-Okcitanismo kaj kontraŭokcitanismo (en esperanto)
- Jusep Lois Sans-Lingva politiko en Arana Valo (en la okcitana)
- Lluís Batlle-Instituto de Nova Historio (en esperanto)
- Rafa Blanco-Introduko en la eŭskan lingvon (en esperanto)
- Teresa Marbà-Malfarante la lingvon (en la kataluna)
- Victor Solé-Mansignado (en esperanto)
- Xavi Alcalde-Unua mondmilito (en la kataluna)

La ligilo al la menciitaj filmoj estas la jena: <https://archive.org/search.php?query=creator%3A%22Kataluna+Esperanto+Asocio>

## ZAMENHOFE PRI JOAN AMADES



Ĉijare, la zamenhoftagan aranĝon oni dediĉis al la memoro de la figuro de la kataluna folkloristo kaj esperantisto Joan Amades i Gelats kadre de la eventoj de la jaro Amades.

Kiel ĉiujare, la pasinta 15-a de decembro la esperantisma movado festis la Esperanto-tagon tutmonde. Ankaŭ ĉe ni, Kataluna Esperanto-Asocio solenis en Espai Vilaweb la naskiĝtagon de Ludwik Lejzer Zamenhof, iniciatinto de tiu lingvo kreita kun la celo estiĝi la internacia helplingvo kiu faciligu fratecon kaj reciprokajn interkompreniĝojn inter la diversaj homoj kaj popoloj.

Ĉijare, la akton oni dediĉis al la memoro de la figuro de la kataluna folkloristo kaj esperantisto Joan Amades i Gelats kadre de la eventoj de la jaro Amades. La prelegon faris la historiisto Dani Cortijo, aŭtoro de la blogo Altres Barcelones kaj membro de la Kultura Asocio Joan Amades. Kelkaj anoj de tiu asocio partoprenis la eventon, kiu enkondukis nian samideano Alfons Tur, kaj kiu taŭgis ankaŭ kiel prezento de la unua eksponilo el la serio “Niaj pioniroj”, komisiita de Kataluna Esperanto Asocio kaj dediĉita, ĉikaze, al Joan Amades.

Pedro M. Martín Burutxaga

# Petit refranyer català-esperanto Malgranda proverbaro kataluna-Esperanto

Pròleg de Víctor Pàmies i Riudor  
Antaŭparolo de André Cherpillod



Els refranys són una de les manifestacions més interessants de la cultura popular. A través d'ells ens arriba fins avui l'experiència acumulada per generacions passades. Les seves frases curtes i contundents condensen en poques paraules els coneixements pràctics de segles.

En aquest recull trobareu un bon nombre de refranys catalans, els podreu comparar amb els seus equivalents en la llengua internacional esperanto i veureu com aquestes petites perles de saviesa tenen una base universal comuna.

*Proverboj estas unu el la plej interesaj elmontoj de popola kulturo. Tra ili ni ricevas hodiaŭ la spertojn akumulitajn de antaŭaj generacioj. Iliaj mallongaj kaj trafaj frazoj resumas en malmultaj vortoj la konojn de jarcentoj.*

*En ĉi tiu kolekto vi trovos grandan nombron da esperantaj proverboj, vi povos ilin kompari kun iliaj ekvivalentoj en la kataluna kaj vi vidos kiel tiuj etaj perloj de saĝeco havas komunan universalan bazon.*